


# gaja haveno 36

Porto Alegre, RS, Brazilo | Majo 2017

## Kelklinie pri

**La dependeco pri interreto** jam estas konsiderata unu el la plej novaj psikiatria malordigoj en ĉi tiu jarcento. Laŭ Nabuco de Abreu, kunaŭtoro kun d-rino Kimberly Young (pionira psikologo en la studoj pri dependeco pri tia tipo de medio) de iu teknika verko, *Dependência de Internet – Manual e Guia de Avaliação e tratamento* [portugallingve], minimume 10% el la monda enloĝantaro suferas pro tiu malordigo. (El la artikolo *Alta Ansiedade: velocidade imediata, local: fora de mim*, de Renato Rocha Mendes, en la *Revista da Cultura* n-ro 111) ●

**Usona lingvisto** studis la brazilan indianan lingvon *pirahã*, parolatan tiam de 360 enloĝantoj de tribo en Amazonio, kaj eltrovis tre atentokaptajn aferojn: la *pirahã* estas lingvo kun nur tri vokaloj kaj ok konsonantoj; ne ekzistas vortoj por numeroj, koloroj kaj eĉ terminoj por indiki kvanton: ĉiu(j), (mal)multe; ne estas subpropozicioj en la frazoj; la parolanto nur povas aludi al homoj kaj objektoj fizike ĉeestantaj antaŭ li aŭ eventoj en kiuj li partoprenis. ●




## Ankaŭ

Ankaŭ dum vintro frostega troviĝas birdet', kiu trilas; ankaŭ dum nokto malhela troviĝas stelet', kiu brilas!

Inter la nuboj grizegaj ankaŭ trairas la suno; portas venteto la suda varmon eĉ dum aŭtuno!


Ankaŭ em mond' egoista troviĝas la kor', kiu amas; ankaŭ dum hor' de l' mizero konsola sper' kiu flamas. ●

> Roman Frenkel



## Matilda

Hodiaŭn en lan lecionon ni lernis lan akuzativon!



## Deveno de kelkaj vortoj

Banano (Kongo)  
Batato (Haitio)  
Bizara (Hispanio – vaska)  
Cigaro (Mez-Ameriko)  
Ĉimpanzo (Kongo)  
Ĉokolado (Sud-Ameriko)  
Dolaro (Germanio)  
Gasoj (Belgio/Nederlando)  
Huragano (Antilioj)  
Jojo (Filipinoj)  
Kanguruo (Aŭstralio)  
Pingveno (Kimrio)  
Saŭno (Finnlando)  
Tobogano (Nord-Ameriko)  
Viskio (Skotlando/Irlando)  
●

> El *Pílulas de sabedoria instantânea da professora Etelvina*, de Max Gehringer

## gaja haveno

Sendependa  
Esperantogazeteto  
Kreita en Julio 1997  
Redaktas  
César Dorneles Soares  
Porto Alegre, RS, Brazilo  
dornelespoa@gmail.com

## Onidire



La homo kiu ne scipovas  
rideti ne povas instali  
vendejon. (Ĉina proverbo)

Mi estas civitano, nek el  
Ateno nek el Grekio, sed el  
la mondo. (Sokrato)

Mi ne havas mesaĝon. Mia  
mesaĝo estas mia vivo.  
(Gandhi)


La dubo estas unu el la  
nomoj de la inteligento.  
(Borges)

La bona afero de la vicoj  
estas konvinki nin, ke fine la  
vivo ne estas tiel mallonga.  
(Mário Quintana)

Mi tremas pro mia patrio  
kiam oni diras al mi, ke Dio  
estas justa. (Thomas  
Jefferson) ●

[www.vortaro.esperanto.org.br](http://www.vortaro.esperanto.org.br)


## La libera pas- kontrolilo



Antaŭ kelkaj jaroj, mi eniris  
en stacidomon en  
Stokholmo, la tiel civilizita  
ĉefurbo de la tiel  
unuamonda Svedio kaj mi  
rimarkis, ke estas inter  
multaj ordinaraj  
paskontroliloj unu por libera  
pasado. Mi demandis al la  
biletvendistino pri la kialo  
de ekzisto de tiu  
paskontrolilo permanente  
tute libera, sen neniu  
gardisto proksime, kaj ŝi  
klarigis al mi, ke ĝi estas  
destinata al la homoj kiuj  
pro ia ajn motivo ne havas  
monon por la bileto. Mia  
nekredema menso kaj  
plena je brazilaj elturniĝoj  
[*jeitinhos*], tute ne povis fari  
la memkompreneblan  
demandon (por ni!): kaj se  
la homo havos monon kaj ĝi  
simple volos trompi la  
leĝon? Tiuj svedaj kaj bluaj  
okuloj sin elpemis en rideto  
de konfuza puro: sed kial  
li/ŝi farus tion? – ŝi  
demandis al mi. Mi ne ŝin  
respondis. Mi aĉetis la  
bileton, mi pasis tra  
paskontrolilo. Malantaŭ mi  
multaj homoj kiuj ankaŭ  
estis akiritaj la bileton. La  
libera paskontrolilo plu estis  
vaka, tiel vaka kia mia  
brazila animo – kaj  
hontiĝinta. ●

> Fonto: Décio Tadeu Orlandi,  
magistro pri Literaturo per  
UFG.

*Tio, kion ni emfaze nomas  
la “triumfon de nia afero” ne  
estas io estonta kaj  
malproksima; tiu triumfo  
konsistas el aro da ĉiutagaj  
konkretaj sukcesetoj nun  
realigeblaj. Esperanto  
“triumfas” ĉiufoje kiam ĝi  
servas al iu.”*



> Hector Hodler (1887-  
1920), fondinto de UEA

## Prilingve

### ► Verbotempoj

Ni en Esperanto esprimas la  
tempon en nereкта citaĵo  
samkiel en rekta citaĵo.  
Ekzemple:

Ŝi klarigis: “Li ne pensas iri.”  
Ŝi klarigis, ke li ne pensas iri.

Tiu analizo samas ĉe ajna  
verbo kiu povus esti  
komprenata kiel citaĵo-farilo.  
Kaj *rimarki* estas ja tia vorto,  
miaopinie.

Mi rimarkis: ŝi volas iri kune.  
Mi rimarkis, ke ŝi volas iri  
kune. ●

> Ferdinand Cesarano/ Usono  
(teksto adaptita)